



**PILO-PRESS**

Internacia  
Informservo

Ĝuropa Esperanto-Revuo

la novstila

moderna  
Esperanto-  
Revuo

**Eldonanto/Herausgeber:**

Ludwig Pickel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg 1  
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 12/1975 - 3 aprilo 1975  
Aperas ĉiusemajne

### Ĝuropa Esperanto-Revuo en televido

Nürnberg (pp). La Bavara Televido prezentis en sia vespera programo, la 3 aprilo 1975, kadre de la informa servo, la unuan numeron de Ĝuropa Esperanto-Revuo, kiu aperas en la eldonejo Ludwig Pickel. Oni informis, ke nun en Nürnberg eliris la unua numero de Ĝuropa Esperanto-Revuo kaj montris grandformate la titolpaĝon, la duan paĝon kaj partojn el la paĝoj 7 kaj 8. Oni povis facile legi la tekston.

La fakto, ke krom la gazetaro ankaŭ la televido interesiĝis pri la moderna, novspeca Esperanto-revuo, montras, ke la eldonejo kaj redakcio estas "sur la ĝusta vojo".

### 48a Kongreso de SAT en Hago

Parizo (pp). Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), Paris, de kelka tempo eldonas gazetarservon. Ĝen ni publikigas la plej novan eldonon:

"En Hago, Nederlando, okazos venontan someron unikaĵo. Tiam S.A.T. (Sennacieca Asocio Tutmonda), Mondorganizo de Laboristaj Esperantistoj, aranĝos sian 48-an internacian Esperanto-kongreson de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1975 en la kongresa konstruaĵo "Op Gouden Wieken", adreso Scheveningsweg, Hago. Al la jam starigita honorkomitato ĝis nun membriĝis: Mag. Marijnen, urbestro de Hago, D-ro A. Vondeling, prezidento de la Dua Ĉambro de deputitoj, D-ro W. Drees Sr., Honorministro de Nederlando (esperantisto), Mag. M. Vrolijk, provincestro de Sudholando kaj ankoraŭ aliaj eminentuloj el ĉiuj tavoloj de nia popolo. Ni atendas proksimume 400 vizitantojn el dudek landoj de la mondo. La urba konsilantaro akceptos oficiale la kongresanaron.

Por plifaciligi la viziton al nia kongreso por kamaradoj, kiuj ne povas transpigi la monon el eksterlando, ni starigis solidaran fonduson.

En la programo estas antaŭviditaj: Solena malfermo de la kongreso kaj salutoj de la diversaj nederlandaj aŭtoritatoj, de nederlandaj laboristaj asocioj kaj de eksterlandaj reprezentantoj. Krom la laborkunsidoj, en kiuj oni pritraktos la vivon, gvidadon kaj agadon de la Asocio, oni prezentos teatraĵojn en la internacia lingvo, okazos prelegoj pri diversaj temoj, oni projektis diversajn ekskursojn kaj multajn aliajn distriĝojn.

Sekretario de la 48-a SAT-Kongreso:

J. Kuypers, Lombardkade 85 - B, Rotterdam - 3001, Nederlando  
Tel. /10-14 90 03 "

La adreso de SAT estas: SAT, 67, avenue Gambetta, F-75020

## Esperanto en ZDF-televido

Paderborn (pp). Marde, la 16 aprilo 1975, estos Esperanto denove en la televido, ĉi-foje en la Dua Programo ZDF, je la 21,15 horo en magazino por distrado kun la titolo "Menschenskinden". Ke Esperanto - nome scenoj el la Esperanto-bareleto - estos prezentitaj en tia leĝera programo, certe ne promesas tro seriozan traktadon de nia afero. Verŝajne Esperanto estos parto de la temo "Kuriose Rekorde, Typen und Superlative" (Kuriozaj rekordoj, tipoj kaj superlativoj).

Pilo-Press ĉi-sekve publikigas raporton pri filmado de la Esperanto-scenoj verkitan de ĉeestintoj:

"La 20an de februaro denove la televido, ĉi-foje la ZDF, filmis en Paderborn pri la intertempe konata restoracio "bareleto" kaj ĝenerale pri la internacia lingvo. La elsendaĵo estos je la 16a de aprilo en programo kun la titolo "Menschenskinden". Antaŭvidebla daŭro estos kelkajn minutojn.

La fakton, ke la amasmedioj subite interesigas pri Esperanto, oni povas ĝoje konstati, kaj la sukceso sendube ŝuldiĝas al la merito de Hermann Behrmann kaj profesoro Frank, kiuj prezentis la internacian lingvon kiel seriozan aferon al la publiko.

Sed ju pli da homoj ekatentas Esperanton des pli zorgeme devas esti planita ĉiu informo el niaj rondoĵoj por ke la kontraŭuloj de nia lingvo ne povas uzi niajn argumentojn kontraŭ ni mem. Rilate al tiu danĝero la aranĝo en Paderborn ŝajnas iom dubinda afero. Krom la rapide el Münster kaj Höxter venigitaj indonezino kaj jugoslavo d-ro Doršić nur tre malmultaj de la "aktoroj" estis kapablaj paroli la internacian lingvon flue. Kelkaj konfesis al la raportistoj, ke ili bedaŭrinde ne parolas Esperanton, dum ĉe najbara tablo la evidentaj malavantaĝoj de la lingvo laŭte estis kritikitaj.

Konfuzaj estas ankaŭ la filmitaj scenoj: kantado de lerneja klaso - ĉu la rigardontoj kredu, ke 40 infanoj en gastejo estas normala kluba rondo? - , docentstile prezentitaj reguloj de la lingvo - anstataŭ trafikaj ekzemploj dum interesa intervjuo kun eksterlandanoj - kelkaj gravaj informoj el la historio de Esperanto kaj fine terura sengustaĵo: ŝerco pri Esperanto rakontita en kolonja (!) dialekto, kiu en la okuloj de niaj kontraŭuloj nur povas ridindigi nian aferon: Tünnes demandas al Schäl, kiu ĵus lernis la lingvon "Kaj por kio estas tiu Esperanto utila?", kaj Schäl respondas: "Ho, mi jam sekvontan jaron tien veturos."

Ni nur povas esperi, ke la televido el tiu miksaĵo kunmetos iom pozitivan elsendaĵon. Ĉiuj samideanoj rigardu la rezulton, por ke ni kontrolu nian impreson al la publiko. Ke la amasmedioj ne raportas, almenaŭ ne povas malhelpi nian aferon, sed malbona raportado povas saboti la laboron de jaroj.

-voko "

## GEA-finanĉoj en bona ordo

Bensheim. (pp) La membroj de Germana Esperanto-Asocio dum ĉi tiuj tagoj ricevas la jarkalkulon de la asocio dum 1974. El la bilanco evidentiĝas, ke la finanĉoj de GEA estas sanaj kaj ke GEA disponas pri likvidaj rimedoj. Sur bank- kaj poŝtĉekkontoj estis fine de 1974 24 692,61 GM, dum la rektaj ŝuldoj nur sumiĝis al 7 997,45 GM.

## Esperano en la radio

Varsovio. La nunaj elsenoj de Pola Radio staras ankoraŭ sub la impreso de la jartrideko pri la finiĝo de la dua mondmilito. Speciale dum aprilo, la tradicia monato de nacia rememoro, tiu impreso plifortiĝos.

La 1an de aprilo oni povis denove aŭdi la intervjuon kun Alina Nowak pri la Auschwitz-Oratorio, teatraĵo laŭ raporto de akuŝistino el la koncentrejo Auschwitz-Birkenau Stanisława Leszczyńska - malliberulino N-ro 41355.

El la Esperanto-versio de la oratorio ni publikigas jenan ekstrakton:

Akuŝistino: Estis decembra nokto.

Kvazaŭ pli varma, pli hela pro la blanko de l' neĝo videbla tra la barakaj fendoj. Eĉ en la barakoj por malsanuloj tie kaj tie enestis puŝite inter la tabuloj verdaj piceaj branĉetoj.

Tio ĉi estis la kristnaska donaco de malliberulinoj el Kommando 117, laborantaj ĉe fosado de tranĉeoj en la ĉirkaŭaj arbaroj. Ili riskis la vivon por alporti kun tiuj ĉi branĉetoj la odoron de l' libereco.

Sur la forno - ĉe kandellumo - akuŝis juna virino, kun misformita korpo simila al troe elkreskinta infano tamen kun la vizaĝo de maljunulino. Ŝi ne forlasis la fornon jam la trian tagon kaj nokton. Ŝi sufokis siajn ĝemojn kvazaŭ ŝi ne volus ĝeni la trankvilon de l' kantetata kristnaska pastoralo.

- pastoralo -

Kaj tiam - ie el fora rando de la barako - aŭdiĝis la krio: - Ne !

Ĝi transformiĝis je hurlado. Nek besta, nek homa. Terura. Hororiga. Kreskis, potenciĝis, skuegis - finiĝante per longa gorĝa hurletado.

Kaj denove la krio fendis la aeron kun duobla forto: - Ne !!!

En la barakon enkuris SS-virinoj kun nigraj pelerinoj kaj kapuĉoj kurtenantaj ŝiajn vizaĝojn. Ili eltrenis eksteren la frenezan virinon. Ŝi ne defendis sin. Ĉirkaŭrigardis per larĝe malfermitaj vintrecaj okuloj kriante sian senfortan "ne" supren al la ĉielo.

Ŝian krion rompis pafserio ĉe la muro de l' morto.

\*\*\*\*\*

Dum la monato marto Pola Radio, Esperanto-redakcio, ricevis pli ol 360 leterojnkaj poŝtkartojn de 58 personoj. La plej multaj korespondadoj venis el Finnlando, dualoke staras Sovetunio, kaj la trian lokon ĉi-foje tenas FRG kun 31 korespondadoj.

Vieno. Kun la plilongiĝintaj tagoj la elsenoj de Vieno fariĝis pli kaj pli bone aŭdeblaj. La semajna komentario de d-ro Peter Dusek kritikis dubindajn financajn rilatojn inter la festludoj Someraĵ kaj Paskaj de Karajan en Salzburg. "...malgranda Aŭstrio ne povos permesi al si kulturajn instituciojn tiel multekostajn kiel la ĵus kritikitaj nepre estas", konkludis la komentisto. "Papo celebris la Solenan Paskomeson en Vieno antaŭ 193 jaroj" estis la titolo de la kultura artikolo.

# Konkurso de Pola Radio

En la 1975 j. pasos la 30-a datreveno de la finiĝo de la dua mondmilito. Okaze de la datreveno ni petas pri respondo al jena demando:

**Kiaj pensoj venas al vi lige kun la  
proksimiĝanta 30-a datreveno de la venko  
super faŝismo kaj finiĝo de la dua mondmilito?**

Respondo al tiu ĉi demando rajtigas al partopreno en lotado de la ĉefaj premioj en la formo de 10-taga ekskurso tra Pollando kaj de multaj aliaj premioj kaj memordonacoj.

La leterojn ni petas sendi laŭ la adreso: Polskie Radio, PL-00-950 Warszawa, P. O. Box 46, en kovertoj signitaj per la devizo „Konkurso“, ĝis la 9-a de majo 1975 j. — decidis la dato de la posta stampo.

La rezultojn de la lotado ni anoncas en la disaŭdigoj de la Pola Radio la 15-an de junio 1975 j.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo fiksota de la Pola Radio.

POLSKIE RADIO  
Warszawa